# *ALBA-TCP ratifas malakcepton de la politiko de trudaj reguloj*

*Image not found or type unknown*

**Sacha Llorenti**

Karakaso, feb 15 (RHK) La plenuma sekretario de ALBA-TCP, Sacha Llorenti, ratifis la malakcepton flanke de la integriga mekanismo de la efektivigo de unuflankaj trudreguloj kontra? suverenaj landoj.

Per sia konto en la socia reto Tvitero, Llorenti raportis pri sia partopreno en la regiona konsulto en Latin-Ameriko kaj Karibio por la Monda Konferenco pri Kulturaj Politikoj kaj Da?ripova Evoluo.

"Ni ripetas la plendon kontra? unuflankaj trudaj rimedoj kiel malhelpo al la ?uado de kulturaj rajtoj", emfazis la estro de la Bolivara Alianco por la Popoloj de Nia Ameriko-Popola Komerca Traktato (ALBA-TCP).

Dum la XXa Pintkunveno de la ?tatestro kaj Registaro, okazinta fine de 2021 en Havano, la ALBA-TCP pledis por travidebla, demokratia, justa kaj egaleca internacia ordo, bazita sur plurflankismo, la observado de la celoj kaj principoj enskribitaj en la ?arto de la Unui?intaj Nacioj.

Tiurilate, la Alianco reasertis la rajton de ?iu ?tato konstrui sian propran politikan, ekonomian, socian kaj kulturan sistemon, libera de unuflankaj trudaj rimedoj, minacoj kaj agreso, kun  paco, stabileco, justeco, demokratio kaj respekto al homaj rajtoj.

Same, la regiona bloko esprimis sian fortan malakcepton de la altrudo de la tiel nomataj sankcioj kontra? landoj de la Alianco, ?ar tiaj agoj minacas la resani?on, la ekonomian rezistecon de la regiono kaj la stabilecon de la tu?itaj nacioj en la nuna kunteksto de la pandemio de Kovim-19.

Fonto: PL

---

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/internacionales/286293-alba-tcp-ratifas-malakcepton-de-la-politiko-de-trudaj-reguloj

RADIO HABANA CUBA

**Radio Habana Cuba**